

Leterkesto, 2-a parto
Claude Gacond, 335-a radioprelego, 1970.03.11 & 14

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni malfermis nian leterkeston kaj jam respondis al la salutoj aŭ demandoj de multaj geaŭdantoj. Ĉar restis leteroj, ni daŭrigas nian babiladon kun niaj geaŭdantoj.

A.- Tiu babilado formas du- aŭ tri-foje en la jaro paŭzojn en nia regula programo. Ĝi estas speco de rimedo por iomete interkonatiĝi.

Cl.- Sinjoro D. B. Gregor en Northampton, Britio, ŝatis la karikaturajn de Baghy kaj deziras ricevi la numerojn de *Svisa Espero*, kie ili aperis. Estas kun plezuro, ke ni tiel dissendas nian svisan gazeteton.

A.- Same petis tiujn karikaturajn sinjoro Walter Kaukal en Neustadt en Weinstrasse, Okcidenta Germanio. Li interesiĝas pri la progresoj de Kultura Centro Esperantista, kiu kreiĝis en Svislando post dissendado de la alvoko, kiun ni legis al vi la pasintan aŭtunon.

Cl.- Ekde la komenco de tiu ĉi jaro mi povis komenci ricevi salajreton por la sekretariado de tiu Centro, kiu rabas al mi multe da tempo. Nun centoj da personoj regule kontribuas per monataj donacoj al la nutrado de tiu salajra fonduso.

A.- Nia laboro estas nun turni nin al la ekster-esperantistaj medioj, por vidi, ĉu ili ankaŭ akceptos kontribui al la financado de tiu Centro. Por tio ni unue informados la ĵurnalistojn, por ke seeble pere de la voĉo de la gazetoj la publiko ekestu informata pri esperanto. Nur poste ni povos peti financon helpon.

Cl.- Estas kompleksa laboro, kiu estas tempo-raba. Dum la jaro 1970 mi persone dediĉos ĉiujn miajn fortojn al la starigo de tiu Centro. Se ĝi povos ekvilibri siajn financojn, nu bone. Tio signifos por Svislando grandan paŝon antaŭen. Se ĝi ne povos ricevi subvenciadon de la komercistoj kaj industriaj medioj, ni devos revizii nian agadon kaj eble forlasi la ideon mem pri la kreado de tiu Centro. Ni tiam revenos al la antaŭa situacio.

A.- Ni dissendas ĉiumonate cirkuleron al la apogantoj. Tiu cirkulero dankas pro la financaj kontribuoj, raportas pri la farita laboro, kaj alportas dokumentojn. La unua kunmetita dokumento estis la programo de Radio-Varsovio. Aliaj dokumentoj estos plej diversaj prospektoj kaj grafikoj pri la kresko de esperanto. Tiel iom post iom en la hejmoj de la helpemaj esperantistoj troviĝos dokumentaro pri esperanto. Tio povos helpi al la informado pri nia lingvo.

Cl.- Sinjoro A. Mathis en Solliès-ville, Francio, ankaŭ petas la gazeton *Svisa Espero* kun la karikaturaj de Baghy. Tiurilate ni menciis demandon de gesinjoroj B. Najbaro en Keighley, Britio. Post tiuj karikaturaj ili ŝatus aŭdi la portreton de bona grup-sekretario. Jen malfacila demando. Ni dediĉos kelkajn elsendojn al la grupa vivo, en kiu ni provos respondi al tiu demando per ekzemploj.

A.- El Britio ankaŭ salutis sinjoro F. Blunden en London, sinjoro John Brownlee en Upminster, gesinjoroj Henry Palmer en Bristol kaj sinjoro Georgo Harttree en Enfield. Ni reciprokas per niaj salutoj, kaj al tiuj, kiuj plendas, ke subite ili ne plu povis nin aŭdi, ni diras, ke la horaro iomete ŝanĝiĝis. Kiam vi ricevas la radio-programon en aŭtuno kaj en printempo, tiam bonvolu ĉiam kontroli, ĉu okazos ŝanĝo en la horoj aŭ ond-longoj.

Cl.- El Nederlando skribis sinjoro Gerard van der Horst en Den Haag. Ni profitas anonci al niaj nederlandaj geaŭdantoj, ke fine de aprilo kaj komence de majo ni restados en Nederlando dum du semajnoj. Ni avertis la UEA-delegitojn kaj la grup-gvidantojn, kies adresoj ni konas,

Leterkesto, 2-a parto
Claude Gacond, 335-a radioprelego, 1970.03.11 & 14

ke ni estas pretaj prezenti aŭd-vidan prelegon pri la etapoj de la svisa federalismo. En tiu aŭdo-vida prelego ni rakontos pri la naskiĝo mem de la federala sento, pri la kreskado de la Svisa Konfederacio. Samtempe ni rimarkigos la paralelismojn, kiuj ekzistas inter pasintaj eventoj kaj hodiaŭaj okazaĵoj. Tiel ni komprenigas al la publiko, ke la federalismo estas respondo al multaj nuntempaj problemoj. Ofte ĝi estas la sola rimedo al interpopolaj konfliktoj. Belaj diapozitivaj transportas la publikon al historiaj situacioj kaj nunaj svisaj pejzaĝoj. Ili faciligas la komprenon.

A.- Ni alvenos en Nederlando la 26-an de aprilo kaj donos la unuan prelegon en Arnhem. Ni restados ĝis la 9-a de majo.

Cl.- Ni eldonis cirkuleron, kie ni donas informojn pri tiu prelego. Skribante al ni pere de Radio-Svislando, vi povas ĝin ricevi. Se grupoj, kiuj troviĝas inter Svislando kaj Nederlando interesiĝas pri tiu prelego, ili ankaŭ petu tiun cirkuleron kaj proponu datojn. Ni estas pretaj aranĝi nian veturon por viziti tiujn grupojn.

A.- El Francio salutis sinjoro Jacques Dony en La Ricamarie, sinjoro Pierre Reynaud en Ménerbes, sinjoro A. Dumarquez en Anzin St. Aubin, la familio Gaston Vidal en Chamalières, kiu deziras ricevi la labor-programon de Kultura Centro Esperantista nun kreata en Svislando. Sinjoro Albert Lienhardt, kiu aŭdis niajn prelegojn pri la geografia nomenklaturado, sendis al ni artikolojn kaj eĉ fotokopion de fundamenta verko pri la geografia nomenklaturado kaj la esperantigo de nomoj. Ni dankas lin. Tiuj dokumentoj helpas nin, ĉar ili alportas interesajn vid-punktojn.

Cl.- El la nordo alvenis salutoj de sinjoro H. Traunmüller en Hägersten, Svedio kaj fraŭlino Olga Ihander en Pietarsaari, Finnlando.

A.- El Okcidenta Germanio salutis sinjoro Artur Scholz en Herford, kiu elektis sian feri-lokon en Svislando dank'al la raportoj de nia radio-kolego doktoro Arthur Baur. Sinjoro Bruno Gahler en Glinde sendis dokumentojn pri la sudet-germanoj.

Cl.- Tiuj gazetoj nin vere konvinkis, ke temas pri blinda naciismo. Nian unuan respondon registris ĉeĥa aŭskultanto. Ĝin poste aperigis la gazeto *Starto*, la oficiala organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

A.- En tiuj sudet-germanaj gazetoj oni kantas la patriotismon al perdita lando, kiun oni devas rekonkeri. Anstataŭ eduki la infanojn al la amo de la naskiĝ-tero, oni edukas ilin al la sopirado de idealigita tero. Estas en tio io malsana.

Cl.- En nia leter-kesto restas ankoraŭ kelkaj ne-responditaj leteroj. La venontan semajnon ni revenos al nia babilado kun niaj geaŭdantoj.

A.- Vi aŭdis elsendon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-